

Johann Wilhelm Ludwig Gleim,
Al la luno

tradukita de Manfred Retzlaff

Lum' via de arĝent'
Lumanta en silent',
Ho luno, pens-amik',
Freŝigas min anime,
Dum mi rigardas vin,
Kaj vi alvidas min,
Starantan malproksime.

Ho kiu, kara lun',
Ekoloĝos post la nun',
Kaj rigardante vin
En tiu ĉi dometo,
Li loĝu en trankvil'
En la arĝenta bril'
Kaj vivu en kvieto.

Ke mi ja tiu ĉi
Ne estas, diras mi
Al vi, ho pens-amik'! -
Deziras mi trankvilon!
Konfidas mi al vi,
Ke konsoliĝas mi
Vidante vian brilon.

*Traduko de la Germana poemo "An den Mond" de JOHANN WILHELM LUDWIG GLEIM (*1719-04-02 – †1803-02-18) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1997.*

MR-302-1 / Arg-783-1568 (2013-01-20 14:49:08)